

Kongresa analizo:

LA FRANCA KONGRESO

Kiuj partoprenis kaj kiuj ne partoprenis en la 100a Universala Kongreso de Esperanto
Ankaŭ el la vidpunkto de la landa statistiko la kongreso estis nura blufado

Laŭ la Kongresa Rezolucio de la 100a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en julio en Lille (Francio) aliĝis entute **2695 personoj el 80 landoj**.¹ En la ĉi-koncerna indekso publikigita en la retujo de Universala Esperanto-Asocio² estas indikitaj la ciferoj 2570 aliĝintoj el 81 landoj. Mi intence uzos ĉi tie la vorton *aliĝi/nt/o/j* kaj bazos la raporton sur la ciferoj de aliĝoj, ĉar (krom UEA, kiu kaŝos tiun informon kvazaŭ kiel ŝtatan sekreton) verŝajne neniu povas scii kiom da homoj reale partoprenis, same ne ĉu ĉiuj aliĝintoj vere pagis la kotizon, kiun ili devis pagi.

Per tio tiu lilla kongreso estis kvante la plej granda depost Berlino (1999), al kiu aliĝis 2712 personoj. En la antaŭa jaro, en Montpeliero, aliĝis ankoraŭ 3133 personoj. Poste la nombro de aliĝintoj draste falis kaj ŝanceliĝis laŭ jena evoluo: Tel-Avivo (1212), Zagrebo (1691), Fortalezo (1484), Gotenburgo (1791), Pekino (2031), Vilno (2344), Florenco (2209), Jokohamo (1901), Roterdamo (1845), Bjalistoko (1860), Havano (1002), Kopenhago (1458), Hanojo (866), Rejkjaviko (1034) kaj Bonaero (706).

La ĉefa konkludo, komento aŭ konstato, kiun oni povas fari koncerne la nombron de aliĝintoj de la lilla kongreso, estas ke tiu nombro ne estas malbona, sed okaze de la 100-jara jubileo oni estus povinta atendi kaj eble atendis pli altan nombron de aliĝintoj kaj partoprenantoj.

La nombroj de la UK en Varsovio '59 (3256), Sofio '63 (3472), Budapeŝto '66 (3975), Varno '78 (4414), Budapeŝto '83 (4834), Varsovio '87 (5946) kaj post tio en Vieno '92 (3033), Prago '96 (2972) kaj Montpeliero '98 (3133) do neniam plu povis esti atingitaj.

Kie do estis kaj estas la „milionoj“ da esperantistoj, pri kies laŭdira aŭ ŝajna ekzisto certaj propagandistoj konstante palavras, blufas kaj fanfaronas?

La tasko de ĉi tiu raporto estas analizi la ciferojn laŭ landa deveno de aliĝintoj en Lillo. La ciferojn kaj indikojn pri deveno de la aliĝintoj eblas trovi krom en la tradicia Kongreslibro kaj Kongresa Kuriero³ ankaŭ en la koncernaj paĝoj de la retujo de Universala Esperanto-Asocio. Rapida superrigarda analizo de la situacio de la landa kaj geografia deveno de la aliĝinta kongresanaro donas sekvantan bildon.

Koncerne la devenon de la aliĝintaro de la ĉi-jara Universala Kongreso en Lillo (2015) oni povas konstati jenajn faktojn:

Unue estu analizata la stato de aliĝoj el *Okcidenta Eŭropo*:

Laŭ la indekso de la retujo de UEA pri kongresaj aliĝintoj, 687 aliĝintoj devenis el *Francio*.

En la Kongresa Kuriero *Belfrido*, kiu publikigis kompletigan liston de aliĝoj, inter la kongresaj numeroj 2571 kaj 2689 aperis ankoraŭ 87 francoj, sed ŝajnas ke grandparto de tiuj aliĝoj jam estas parto de la indekso de la retujo de UEA, kiel (unuopa) kontrolo de nomoj evidentiĝis (kelkaj nomoj mankis). Do, oni povas paroli pri almenaŭ 700 aliĝoj el Francio,⁴ kio estas 26 procentoj de la tuta kongresanaro, kio signifas, ke pli ol unu kvarono de la kongresanaro en Lille estis francoj. Se aliĝis nur 2570 personoj, ĉe 700 francoj la procentaĵo estus 27%.

Dum tiuj homoj venis el plej diversaj regionoj de Francio, el la urbo Lille mem aliĝis 7 kaj el Boulogne-sur-Mer mem, loko de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905, 2 personoj. Eble ekzistas ankoraŭ kelkaj

¹ Vd. <http://www.uea.org/gk/584a1>. En la teksto de la rezolucio, kiu estis rete dissendita de UEA la 4an de aŭgusto, estis indikita la cifero de 82 landoj. La definitiva nombro estas 2698 aliĝintoj el 80 landoj (<http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2015/Fina-statistiko-de-Lillo-2698-aligxintoj-el-80-landoj>, 21.8.15), kvankam en la indekso sur uea.org oni trovas la ciferojn 2691 el 81 landoj (http://www.uea.org/kongresoj/alighintoj_laulande?jaro=2015, 21.8.15).

² Vd. http://uea.org/kongresoj/alighintoj_laulande, kie ĝis la tago de la publikigo de ĉi tiu raporto (8.8.) estis registritaj 2570 personoj el 82 landoj.

³ Kiu publikigis kompletigon de aliĝintoj laŭ n-roj 2485-2689. Ŝajnas, ke grandparto de la aliĝintoj aperintaj inter la kongresaj numeroj 2571 kaj 2689, kiuj estis aldone publikigitaj en la Kongresa Kuriero *Belfrido*, jam estas integritaj en la indekso de la retujo de UEA, do aperas iu stranga diferenco inter ciferoj 2695 (Kongresa rezolucio) kaj 2689 (Kongresa Kuriero) unuflanke kaj indekso en la retujo de UEA (2570) aliflanke.

⁴ Oficiale estis finfine 724.

esperantistoj en la koncernaj departementoj kaj regionoj, sed tiuj malaltaj ciferoj indikas, ke la Esperanto-movado en tiuj urboj kaj regionoj devas esti malforta.⁵

Nun ni rigardu la ciferojn de aliaj okcident-eŭropaj landoj.

El *Germanio* aliĝis 193 personoj. Inter ili troviĝas multaj geedzoj kaj familioj. Rapida trarigardo montras, ke la plimulto venis el okcidenta Germanio, dum 10-20 personoj venis el orienta Germanio (iama GDR), ĉefe Dresdeno, Lipsiko, Cottbus, Pirna kaj probable orienta Berlino. Ŝajnas ke la mil-dumil esperantistoj, pri kiuj GDREA sisteme fanfaronis, grandparte elvaporigis.

Aŭstrio konsistigas tradicie malgranda grupo; ĉifoje estis nur 17 aliĝintoj, inter kiuj troviĝis unu kvarpersona familio.

La delegacio el *Svislando* ampleksis 47 personojn, de kiuj la plimulto loĝas en la franclingva parto.

El *Nederlando* aliĝis 77 personoj, inter kiuj parto estis oficistoj de la CO de UEA. El najbara *Belgio* aliĝis 90 personoj, ĉefe el Flandrio. *Luksemburgio* estas iom speciala kazo, ĉar de tiu lando devenas krom la kvar-membra hungar-franca familio Ertl kaj la paro Moon (anglo)-Nourmont (francino) nur tri aliaj esperantistoj, inter kiuj unu estas belgo laboranta en Luksemburgo. Ĉu tiuj personoj posedas la luksemburgan ŝtatancon, ne estas konate.

Nun ni turnu la atenton al Britio, Irlando kaj Norda Eŭropo (Skandinavio): El *Britio* venis 58 kaj el *Irlando* 2 aliĝoj. *Danlando* sendis 43, *Finnlando* 41, *Svedio* 37, *Norvegio* 22, *Islando* 5 aliĝintojn, inter kiuj troviĝas unu italo.

En la sekvo ni nombru la aliĝintojn el sudeŭropaj landoj: El *Italio* aliĝis 85, el *Hispano* 51 (nur malmultaj venis el *Katalunio*, iama Esperanto-„bastiono“), el *Portugalia* 7 personoj. Aliĝintaj *grekoj* estis 2. El *Kipro* ekzistis 1 aliĝinto.

Kaj nun interesas nin *Orienta Eŭropo*, kie sisteme la Esperanto-movado „furoris“, sed intertempe ŝrumpis al kerna, pli malpli neglektebla minimumo.

El la iamaj Esperanto-„bastionoj“ *Pollando*, *Hungario* kaj *Bulgario*, kies landaj asocioj havis ĝis la kolapso de la komunismo (dek)milojn da kolektivaj membroj, kun 109 aliĝintoj la grupo el *Pollando* estis relative granda (Varsovio 17, Bjalistoko 12, Nowy Sącz 10, Poznań 3!), tiu el *Hungario* kun 40 personoj (unu 4-persona familio el Mosonmagyaróvár) estis malgranda kaj tiu el *Bulgario* kun nur 16 aliĝintoj estis mikra (3 aliĝintoj kongruis kun delegitoj de UEA kaj Petăr Todorov estis la sola kaj lasta internacie konata bulgara Eo-aktivulo).

El *Ĉeĥio* aliĝis 49 kaj el *Slovakio* 26 personoj (la ĉi-lastata nombro estas atentinda vide al la UK 2016 okazonta en Slovakio; el Nitra estis unusola aliĝo).

Nun ni rigardu la nombrojn de aliĝintoj el la respublikoj de iama *Jugoslavio*:

Slovenio 1 (eĉ ne sloveno), *Kroatio* 8, *Serbio* 2, *Bosnio-Hercegovino* 1 (honora membro Simo Milojević!, sed ĉu li ankaŭ vere partoprenis? – kie estis la homoj de IJK Sarajevo 2006?).

Rumanianoj aliĝis 12, *Albanio* registris 1 aliĝinton, sed ne temas pri albano, do neniu albano aliĝis.

El la Baltaj Ŝtatoj aliĝis: *Litovio* 35, *Latvio* 11, *Estonio* 6.

El *Ruslando* aliĝis 49 homoj (Moskvo 15, SPB 3, Kaliningrad 1, resto el eŭropa kaj azia Ruslando).

El *Ukrainio* aliĝis 12 personoj (Kievo 6), el *Belorusio* 2, *Armenio* 3, *Kartvelio* 3 kaj el *Kazaĥstano* 2 personoj.

Ĉu esperantistoj el orienta Eŭropo tro malabunde aliĝis, ĉar ili estas malriĉaj kaj ne havas monon? Povas esti, kvankam tiu klarigo estas certe tro simpla, des pli ke la limoj estas malfermataj kaj ĉiu individuo rajtas vojaĝi eksterlanden (vojaĝi mem estas relative malmultekoste, sed la restadkostoj en eksterlando ja estas altaj, kaj ĉu la kotizo de UK estas tro alta, pri tio oni povas diskuti, se kompari kotizojn kun aliaj kongresoj, kiuj ofte estas multe pli altaj). Ankaŭ dum la komunismaj tempoj orienteŭropaj esperantistoj estis malriĉaj kaj ne havis sufiĉe da mono, sed ili tamen klopodis vojaĝi, malgraŭ la fermataj limoj. Do, la vero estas, ke en tiu landaro ekzistas tro malmultaj esperantistoj!

Nun pri Azio: Kun 166, 87 kaj 55, do kun entute 308 aliĝintoj la landogrupo *Japanio*, *PR Ĉinio* kaj *Korea Respubliko* (suda *Koreio*) formis la plej grandan grupon de aliĝintoj el orienta Azio. Unuopaj azianoj aliĝis el *Irano* 28, *Israelo* 18, *Vjetnamio* 10, *Nepalo* 8, *Mongolio* 7, *Tajvano* 6, *Pakistano* 5, *Indonezio* 3 (Indonezio estis akceptita

⁵ En Boulogne-sur-Mer UEA havas 1 kaj en Lille 2 delegitojn.

kiel nova Landa Asocio de UEA), *Orienta Timoro* 3, *Hinda Unio* 2 (Dasgupta, Rao), *Libano* 2, *Hongkongo* 1, *Singapuro* 1, *Birmo* 1.

Interesa kazo estas *Turkio* (al kiu kontinento cetere apartenigi ĝin?): 9 (ĉiuj el Istanbul – 5 ĉinoj, 1 germano – Thomas Bormann!).

Nun restas ankoraŭ kelkaj aliaj ekstereŭropaj landoj, pri kiuj ni disponigas jenajn ciferojn:

Ameriko: *Brazilo* 115!!! (ĉu vere ĉiuj partoprenis?), *Usono* 45, *Kanado* 26, *Meksiko* 25, *Kubo* 12, *Argentino* 6 (kie estas la „daŭripova“ efiko de la pasintjara kongreso?), *Kolombio* 3, *Nikaragvo* 2, *Venezuelo* 2, *Kostariko* 1, *Urugvajo* 1, *Ĉilio* 1 (estrarano de UEA), *Dominika Respubliko* 1.

Aŭstralio 16, *Novzlando* 2.

Afriko: *Konga DR* 12, *Benino* 3, *Komoroj* 3, *Niĝerio* 3, *Togolando* 2, *Ruando* 1, *Burundo* 1, *Senegalo* 1, *Sudafriko* 1, *Madagaskaro* 1.

Laŭ mondopartoj la 100an Universalan Kongreson de Esperanto en 2015 en Lillo do konsistigis jenaj ciferoj kaj procentaĵoj de aliĝintoj:

Okcidenta Eŭropo: 1411 (t.e. 724 sen Francio), t.e. 52,36%.

Orienta Eŭropo: 265 (PL, HU, BG, CZ, SK, eks-YU, AL, RO), 52 (LT, LV, EST), 71 (RUS kaj eks-SU). Sume 388, t.e. 14,4%. *Eŭropo entute*: 1799, t.e. 66,75%.

Azio: 412 (kun Japanio, Ĉinio kaj Koreio 308 kaj Turkio 9), t.e. 15,3%.

Ameriko: 240 (kun Brazilo 115), t.e. 8,9%.

Afriko: 28, t.e. 1,04%.

Aŭstralio kaj Novzlando: 18, t.e. 0,67%.

Laŭ la listo de (vivantaj) *Honoraj Membroj* de UEA aktuale ekzistas 46 personoj de tiu kategorio.⁶ Iliaj nomoj estas kutime inkluzivataj en la listo de aliĝintoj al UK. Estas konate, ke ĉirkaŭ kvarono ĝis triono de tiuj honoraj membroj ne partoprenas en la UK. Sed tiuj ciferoj apenaŭ grave influas la ĝeneralan bildon aŭ statistikon.

Koncerne la movadan konatecon de la aliĝintoj, okulfrapas, ke la granda plimulto de iliaj nomoj ne estas internacie konataj (eble pli konataj ili estas en la naciaj kaj lokaj movadoj). En ĉi tiu kategorio ne estas klare, ĉu en ĉiuj kazoj temas pri veraj esperantistoj aŭ ĉu nur pri akompanantoj, familianoj (inter ili infanoj) kaj turistoj, kiuj parte malbone aŭ eĉ ne parolas Esperanton. En filmo kaj teatro oni nomas ilin statistikoj aŭ figurantoj. Kvankam tiuj kongresanoj portas individuan nomon, en sia tuteco ili aperas kiel anonima amaso. Alia grupo aŭ kategorio de kongresanoj konsistas el tiuj, kiuj ĉiujare aliĝas kaj partoprenas en la UK. Ne necesas forgesi tiujn (elstarajn) esperantistojn, kiuj kutime ne aliĝas nek partoprenas en la UK; ilia foresto signifas grandan mankon por la kongresa programo.

Konklude pri la landa (aŭ geografia) deveno de aliĝintoj oni do povas diri, ke en la 100a Universala Kongreso de Esperanto partoprenis ĉefe homoj el Francio (ĉ. 700), Germanio (193), Japanio (166), Brazilo (115), Pollando (109). Tiuj landoj kune generis 1270 aliĝintojn aŭ 47,12 procentojn; kun Belgio (90), Ĉinio (87) kaj Italio (85) la nombro de aliĝintoj sumiĝas je 1532 aŭ 56,85 procentojn, do pli ol duono. Se tiuj grupoj ne ekzistus, la Universala Kongreso havus penon kolekti 2000 aŭ eĉ nur 1500 aliĝojn. Dume ili ankoraŭ ekzistas sed povas varii de jaro al jaro, depende de la kongresloko. Evidente tro malgrandaj estis la grupoj el Hungario, Bulgario, Hispanio, Baltaj Ŝtatoj, Slovakio, eksa Jugoslavio, Ruslando kaj eksa Sovetunio, Usono kaj Nordameriko. Grandaj delegacioj el orienta Eŭropo preskaŭ komplete forestis kaj la kapacitoj en okcidenta Eŭropo ŝajnas elĉerpiĝi (precipe draste en la kazoj de GB, NL, E/Cat, DK, S, SF, IS). Sendube modestaj estas ankaŭ la nombroj de aliĝintoj el Azio (kie vivas 60% de la homaro, nome 4,351 mrd., sen Ruslando) kaj preskaŭ neglektebla estas la ciferoj pri Afriko. La Universalaj Kongresoj de la pasintaj jaroj (ekzemple Bergeno, Roterdamo, Kopenhago, Rejkjaviko, Bonaero) do esence ne povis generi kvante kaj kvalite novajn ‘amasojn’ da esperantistoj – ĝuste el tiuj landoj estis plej malmultaj UK-aliĝintoj.

Laŭ la prezentitaj ciferoj la krizo de la internacia Esperanto-movado do estas absolute videbla. Oni vidos kiom da homoj aliĝos al la venontjara UK en orienteŭropa Slovakio, kie la movado estas malforta kaj ne disponas pri tiel multaj „francoj“ kiel en Lillo. (Dum la franca Landa Asocio havas oficiale mil membrojn, la slovaka LA havas nur 70).

⁶ Laŭ la listo (47) publikigita sub: https://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_honoraj_membroj_de_UEA (minimume 1 persono intertempe forpasis, nome Hans Bakker)

Do, sendepende de tio, ĉu aliĝis 2695 personoj el 80 landoj, la komuniko, ke estis aliĝintoj el 80 landoj, devas esti konsiderata esence kiel neta bluf, kvankam statistike eble ĝuste. Kiel supre montrate, la plimulto de aliĝintoj originis el nura deko da landoj.

Analizindaj restus la aĝo kaj reala Esperanto-scipovo de tiuj aliĝintoj kaj eventuale aliaj sociologie interesaj kaj esencaj aspektoj, ekzemple kiom da personoj aliĝis al la UK surbaze de diversaj varb- kaj lern-kampanjoj en la interreto, de kiuj la Esperanto-movado atendas miraklon de la renoviĝo, kiu verŝajne ne okazis/os, la ĉiujara konstanteco kaj ŝanĝiĝo de la konsisteco de la aliĝantaro/partoprenantaro aŭ la esploro kiuj estas la aliĝintoj el Kubo, Vjetnamio, Ĉinio, Irano, t.e. kiun funkcion ili havas en siaj landoj, ktp. Por akiri tiajn sciojn estus grave fari integrajn enketojn inter la kongresaj aliĝintoj mem.

Do, povas esti, ke Lillo estis kaj restos por longa tempo kvante la plej granda kongreso, se oni ne kapablos allogi novajn publikojn, kiuj plene anstataŭos la pioniran kaj post-pioniran generacion, kiu praktike funkciis ĝis la kolapso de la komunismo en 1989-91, kio estis grava cezuro en la historio de la Esperanto-movado, kaj kiu nun estas elmortonta. Tiu sorto povus trafi ankaŭ Esperanton kaj ĝian movadon mem.

Verkita de Andreas Künzli kaj publikigita sur www.planlingvoj.ch en aŭgusto 2015.

(La aŭtoro, aliĝinta al la Esperanto-movado en 1979 kaj forlasinta ĝin antaŭ kelkaj jaroj, ne partoprenis en la 100a UK en Lillo kaj faris tiun analizon surbaze de statistikaj datenoj troveblaj en la interreto).

Aliaj artikoloj ligataj kun la temo:

Nombro de membroj de Landaj Asocioj de UEA:

http://www.plansprachen.ch/Demokratiefeindliche_Toene_an_Esperanto-Weltkongress_2014.pdf

Komento pri la strategia vizio de UEA:

<http://www.planlingvoj.ch/UEA-strategio.pdf>

Enketoj pri eraroj de Esperanto:

http://www.planlingvoj.ch/Enketo2013_erarojEsperanto.pdf

13 hipotezoj pri Esperanto:

http://www.planlingvoj.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf

Cherpillod la Franco (recenzoj):

http://www.planlingvoj.ch/Cherpillod_franco.pdf

100 jarojn post la morto de Louis Couturat (1914):

http://www.planlingvoj.ch/Couturat_100.pdf

© A. Künzli, Svislando. www.planlingvoj.ch, aŭgusto 2015.